

## Redakta informo

### kaj alvoko al potencialaj aŭtoroj

Sciencisto estas persono, kiu elektis kiel profesion: sciencan pensadon kaj sekvan sciencan publikigon de siaj pensoj kaj laborrezultoj. Sciencistoj pensas filologie kaj teologie, psikologie kaj natursciencas, arte kaj teknike, socie kaj politike. Ili ofte trovas dum faka pristudado de publikigitaj verkoj de samfakuloj, ke tiuj jam pensis la samon aŭ havis similajn pensojn.

La arda deziro, kiu ofte delogas aŭtoron, diri ion eksterordinare grandan, neniam antaŭe aŭditan, senekzemple novan aŭ nekredeble aŭdacan ne malofte rezultas aŭ en la ekaperado de iu malnova veraĵo en nove vestaĵo - aŭ en la fakto, ke nenio estos surpaperigata de la ideoj de la senkuraĝigita potenciala aŭtoro.

Ĉu tio signifas, ke oni ne plu povas ekspekti en sciencaj artikoloj novajn pensojn? Ĉu oni - ĉar ja ĉio jam estas pripensita kaj tute ne nova - rezignu pri legado respektive verkado de scienca artikolo? Aŭ ĉu oni entute rezignu pri pensado?

Estas konsole, kompari nian pensadon kiu montriĝas en tiuj tri demandoj kun la naturo en nia media ĉirkaŭaĵo tiom endanĝerita de la homo. Ankaŭ la naturo mem ja ne ofertas ĉiutage iun funde novan. Tamen en ĉiu nova sezono de la jaro ĝi ŝajnas al ni tute nova, spite de nia homa detruemo.

Kial ne la samo kun pensado, kiu ja ankaŭ estas naturo, plene natura fenomeno? Maljuna kiel la eterno homa pensado estas, kaj same nemorta. Ili ne nepre devas esti tute novaj, la pensoj de iu homo, sed ili povas esti valora en internacilingva vestaĵo de vereco, klareco kaj aktualeco. Ili ne devas esti tute novaj en la plej malvasta senco de la vorto, kiam ili nur estu bonaj kaj enhavu movigan forton, plijunigi la veron kaj movigi ion.

Jes, ion movigi esperantlingve en la diversaj sciencaj kampoj kaj inspiri aliulojn, mem verki esperantlingve en la propra fako pere de pensado kaj publikigado - tio estu la celo de Scienca Revuo.

Prof. *Bociort* pensis filozofie en artikolo pri eminenta rumana verkisto. Prof. *Sachs* retrospektive pripensis natursciencas siajn 25 jarojn da scienca kunlaboro en nun centjaraĝa tropika instituto. S-ro *Kalkhof* pensis historie pri Sankta Bonifaco la misiisto, papa legato kaj martiro, dum prof. *Nagata* psikolingvistike pensis pri la Esperantaj *mal*-vortoj kaj d-ro *Kavka* instruas per filologiaj pensoj la potencialajn aŭtorojn pri bazaj premisoj por la scienca leksiko de Esperanto.

Esperante ke la kontribuajoj en tiu ĉi tria kajero de la 2000a jarkolekto de Scienca Revuo stimulas vin, karaj samISAEanoj, verki mem artikolon el via propra faka laborkampo por publikigo en nia asocia organo, mi deziras al vi distran legadon.

R. Sachs, prezidanto de ISAE

## Mihai EMINESCU, la meditema poeto\*

### 150-jara datreveno de lia naskiĝo

Ignat F. BOCIORT

*Mihai EMINESCU* (1850-1889) estas la plej granda rumana poeto kaj unu el la elstaraj lirikistoj de la monda literaturo. Li apartenas al la sama spirita familio kiel *Novalis* en Germanio, *Lenau* en Aŭstrio, *Leopardi* en Italio, *Lermontov* en Rusio. La specifeco de lia poezio esprimiĝas per du trajtoj: li estis poeto-filozofo kaj pesimisto kun idealoj.

Senkompara konanto de la rumanaj lingvo kaj literaturo, de grandaj eŭropaj poetoj, precipe de la germanaj, anglaj, francaj, hispanaj kaj rusaj, de monda historio, de malnovaj religioj (helena, bramena, budhista), li samtempe alte taksis la folklorajn kreaĵojn kaj, laŭ *Herder*, li vidis en tiuj produktoj la animojn de la popoloj. La naturo, la amo, la tuthomaraj idealoj trovis en lia verko altnivelan esprimon, antaŭe nekonatan en la rumana beletra.

Li fakte estis la kreinto de la belarta nacia lingvo. Vastan kulturon (lin interesis ankaŭ naturaj kaj "ekzaktaj" sciencoj) li unuigis kun la amo de la simplaj homoj, de la kamparanoj, kies moralaj ecoj, aspiroj al ĝusteco, kies optimismo - spite al malfacila vivo - karakterizas la unuan fazon en la evoluo de liaj poeziaĵoj. Specifaj por tiu fazo estas jenaj versoj el lia ampleksa poemo "Imperiestro kaj proleto":

*Detruu sociordon kruelan kaj maljustan  
la mondon dividantan; jen riĉaj, jen mizeraj* (1)

*Eminescu* naskiĝis en la vilaĝo *Ipotesti*, en Norda Moldavio, kiel filo de vilaĝa oficisto. Estas rimarkinde, ke tiu malgranda regiono donis al la rumana kulturo ankaŭ aliajn unurangajn kulturkreaĵojn: la komponistojn *Ciprian Porumbescu* kaj la mondkonatan *George Enescu*, kaj la plej grandajn rumanajn prozistojn *Ion Creanga*, *Mihail Sadoveanu* kaj aliajn. La estonta poeto vizitis la germanlingvan gimnazion en *Ĉernoviz*, studis filozofion kaj historion en Vieno kaj Berlino. La kontakto kun la filozofio de

\* Prelego kadre de Esperanto-Ligo Berlino, la 21an de februaro 2000

*Schopenhauer* skuis lian konvinkon, ke la idealoj de justeco kaj libereco de la homaro, de sincera amo kaj digna vivo estus realigeblaj. Por *Schopenhauer* ili estas vanaj, kaj tiu ideo montriĝis por *Eminescu* prava, ĉar la politikistoj senhonte estis mensogantaj kaj perfidantaj la popolon. La heroa generacio de la 1848aj jaroj estis jam maljuna, malforta, la kontraŭpopolaj imperioj ŝajnis nevenkeblaj. La esprimo de idealoj fariĝis en la liriko de *Eminescu* pli fervora kaj samtempe pesimisma, precipe ĉar ankaŭ liaj vivospertoj montris baldaŭ al li, ke en la mondo regas la malrespekto por ĉiuj altaj sentoj kaj pensoj.

Grandajn ĉagrenojn faris al li ankaŭ la virinoj. Al la amo li dediĉis altspiritajn versojn, kiaj la iamaj de *Dante* kaj *Petrarca*. Samtempe liaj kvin "Satiroj" akre mallaŭdis kaj la politikistojn kaj la virinojn.

Li trovis sian trankvilon en du vivosferoj: en la naturo kaj en la tuthomaj idealoj. Tiujn du temojn li prikantis en poemoj diverstipaj, sed ĉiam klaraj, ofte popolstilaj.

Pluraj romanoj de *Eminescu* estas ĝis hodiaŭ larĝe konataj, kantataj, pluraj liaj versoj cirkulas kvazaŭ anonimaj kreaĵoj. *Eminescu* atingis la celon de ĉiu poeto, nome tiun: longe resti en la konscienco de la posteuloj.

Jam la antikva poeto *Horatius* (65 - 8 a.K.) konsciis, ke per siaj versoj li kreis al si monumenton pli daŭra ol la bronzo (*Exegi monumentum aere perannius*). Tiun poezian motivon reprenis poste poetoj diversnaciaj, postulante, ke oni ne serĉu ilin en la tomboj, sed en la versoj parkere konataj. Ankaŭ *Eminescu*, en la poeziaĵo "Preter la senparaj poploj" esprimis la ideon, ke la daŭro de liaj versoj farintus senmorta la edzinon prikantatan de li.

La versoj de *Eminescu* ne fariĝis "la dolĉa muta buŝo de la pasintaj tempoj". Male, ili estas ofte cititaj kiel sintezojn de ĝoja, dolora, indigna reago, de meditado pri politika aŭ ĉiutaga filozofio. Kontraŭ la mensogantaj kaj friponaj hodiaŭaj politikistoj, la ĵurnaloj, revuoj aŭ simplaj homoj citas akre kritikantajn versojn de *Eminescu* ("La Tria Satiro"):

*Venu vi, fama Drakulo, kaptu ĉiujn-ĉi fiulojn  
Dividu ilin dugrupen: frenezuloj kaj aĉuloj,  
Firme ligu ilin fere kaj ne ŝparu la ĉenerojn  
Bruligu frenezulejon, ekbruligu la karceron.*

La estetikaj koordinatoj de la liriko de *Eminescu* kaj samtempe la internacia valideco de lia estetiko esprimeblas per kvin atentindaj konceptaĵoj, nome:

1. La fama "atika stilo" de la helenaj klasikuloj: klara, altnivela stilo de arto "simpla kaj perfekta", de kulturo kiu "ne koruptas la animojn". Por *Eminescu*, la beletro estis nutraĵo por koro kaj menso.

2. Ŝekspiro konsilis la poetojn: "Pli da enhavo, malpli da poetikado", t.e. malpli da ekstravagancoj, de formaj ludadoj sen enhavaj necesoj. Nenie troviĝas en la versoj de *Eminescu* formalaj versludoj de la poetoj sen filozofiaj kaj socipolitikaj konceptoj.

3. La rumana elstara dramverkisto kaj prozisto *Camil Petrescu* (1894-1957) signifoplene asertis: "Mi vidis ideojn". Tiun aserton povintus fari ankaŭ *Eminescu*. Ĉiu idealisto "vidas ideojn", aŭdas ties "kantojn" kaj "petojn" pri helpo, dum la "realistoj" aŭdas nur la tintadon de mono. Eble pro sia granda intereso por filozofio kaj historio, por la verkoj de *Hegel*, *Schelling*, *Fichte*, *Schopenhauer* kaj ĝenerale por la germana kulturo, en kiu li precipe formiĝis kaj kiun li konsideris kiel tre filozofian kulturon, li ofte konkretigis ideojn en artajn formojn (sciante, por *Hegel* "valida poezio estas abstrakta ideo en sensebla formo").

4. La rumana poeto kaj filozofo *Lucian Blaga* (1895-1961) skribis: "*La eterneco naskiĝis en vilaĝo*". Per tio li asertis, ke la senmortaj verkoj fontis en simplaj medioj, estis skribitaj por puraj konsciencoj. La tezo taŭgas por *Eminescu* pli ol por iu ajn alia rumana poeto. Li trairis vilaĝojn, de Moldavio kaj Transilvanio, kolektis versojn, kantojn, eldiraĵojn kreitajn de la popolo mem. En siaj ĉefverkoj li ofte reprenis folklorajn motivojn, donis al ili altnivelan filozofian signifon kaj brilan artformon, tial liaj kreaĵoj ĉarmas kaj la plej kulturitajn kaj la plej simplajn legantojn.

5. Li unuigis la superan kulturon kun la elektitaj postuloj de la tradicio. Li konsciis, ke ĝuste la popolo estas ege serioza, havas altan koncepton pri la kulturo, postulas ĉefverkojn, dum la tiel nomata "publiko de certa kategorio" kontentiĝas kun banalaĵoj. Liaj verkoj unuavice direktiĝis al popolamasoj, kies parto li sin sentis. Iam li skribis: "*Pasia amiko de la popolo mi estas kaj nenium okazon mi perdas por partopreni popolajn festojn. Mi sentas min parto de tiu totalo. Estas io dieca en tiu sento. Ĉiu popola festo similas al alta ĝojo de la animo, al pieca preĝo (...). Mi amas tiun popolon, bona, milda, homeca*".<sup>(2)</sup> Lia iama kunstudento en Vieno, *Ion Slavici* (1848-1925) rakontas en siaj memorajoj, ke *Eminescu* tiom bele kaj entuziasme kantis popolkantojn, ke, aŭskultante kaj rigardante tiun junulon belan kiel antikva dio, estis plorantaj en vienaj gastejoj la rumanaj kamparanoj venintaj el Transilvanio.

La granda poeto estis konata "universalisto", aŭ, kiel oni estis diranta tiutempe, "kosmopolito". En siaj poemoj li prikantis ne nur rumaniajn lokojn aŭ historiajn eventojn. Estas admirindaj liaj varmaj kantoj pri lokoj kaj landoj, kiujn li neniam estis vidinta: Egiptujo, kies piramidoj tiom multe povintus diri, se ili povus paroli; Libano, kie li "vidis" belegajn kaj decajn virgulinojn trapasantajn kun levitaj ĵupoj iun rivereton ktp. ktp. En sia grandega poemo "*Memento mori*" li faras ampleksan panoramon de la tutmonda

historio, kun larĝperspektivaj, iufoje profetaj komentoj pri diversaj por la koncernaj popoloj signifaj momentoj. La poemo finiĝas en pesimisma perspektivo, ĉar la poeto ne vidas fortojn kapablajn renversi la malbenitajn vojojn al dolorigaj eventoj, por ke la lumo kaj la justeco venu al malbone kreita mondo.

La pesimismo estis kaj restis unu el la problemoj de la lasta fazo de la liriko de *Eminescu*. Lin iufoje la literaturhistorio taksis kiel "la lastan eŭropan romantikiston", sed fakte li naskiĝis romantika, lia romantikismo estis spiritostato, ne produkto de la koncerna eŭropa tendenco, kvankam certan influon de tiu tendenco li spertis: romantikistaj motivoj, stilaj kontrastoj ("Imperiestro kaj proleto", "Anĝelo kaj demono", "Venero kaj Madono" ktp.). Lia romantika animostato vidiĝas en kredo je idealoj, amo al meditado, profunda kaj sincera amo, tendenco verki pri altaj ĉielaj sferoj, pri kosmogonio kaj tuthomara destino.

La perdon de gravaj idealoj kaj de puraj sentoj en nekomprenebla mondo, li komparis kun la sinkado de surmaraj ŝipoj kaj kun la pereado de senkulpaj migrantaj birdoj.

*Da centopaj ŝipaj mastoj / Forlasintaj bordsignalojn  
Kiom ŝiros tra la vastoj / La marventoj, la ondfaloj?  
Da birdetoj alflugontaj / Are sub ĉieltegmento  
Kiom mortos endronontaj / Pro l'ondfaloj, pro l'marventoj?  
Ĉu postkure al bonŝanco, / Ĉu al altaj idealoj,  
Ĉien sekvos vin la danco / De l'marventoj, de l'ondfaloj.  
Senkomprenaj restas penso / Poemita, viaj sentoj  
Ĉiam bruas ilin denso / De l'ondfaloj, de l'marventoj.  
("Da centopaj ŝipaj mastoj". Esperantigis: *Constantin Dominte*)*

En alia poeziaĵo, la destino de geniulo - nekonata, "nevidata" dum lia vivo, multflanke vidata post la morto - estas komparata kun la stelo, kies lumon oni ofte nur vidas kiam eble la stelo mem estingiĝis.

*Ĝis ekaperinta stel' / Estas vojego tia  
Ke bezonegis ĝia hel' / Jarmilojn ĝis ter' nia.  
De longe, eble, tiu sun' / Jam estingiĝis ie  
Sed ĝia lum' apenaŭ nun / Atingis nin ĉi-tie  
La bild' de l'stel' ŝovanta sin / Sur la ĉiel' majestas  
Ĝi estis, ni ne vidis ĝin / Vidata, ĝi malestas.  
("Ĝis la stelo". Esperantigis: *Petre Firu*)*

La grandajn dimensiojn de la poetika universo de *Mihai Eminescu* montras ankaŭ la fakto, ke li verkis kaj lulkanton por infanetoj kaj la plej gravan filozofian poemon de la rumana literaturo, "La Vesperstelo".

Jen tre konata lulkanto:

*"Eĉ birdeto jam dormema / Serĉas neston ombre dronan  
Sur la branĉo ek-ektrema / Nokton bonan!  
Nur de l'fontoj mildas ĝemo / Dum arbaro nigras lace  
Dormas floroj en ĝardeno / Dormu pace!  
Cigno ŝvebas tra kanejoj / Serĉas neston kviethavan  
Vin proksimu la anĝeloj! / Songon ravan!  
Sin la bela luno levas / Sur la mondon songaroman  
Harmonie ĉie revas, / Nokton bonan."  
("Nokton bonan". Elrumanigis: *Imre Szabó*)*

La poemo *Luceafărul* (Vesperstelo - la popola nomo por la planedo *Venuso*) estas la plej grava kreaĵo de *Eminescu* kaj samtempe de la rumana literaturo. Ĝi baziĝas sur popola fabelo nomita "La filino el la ora ĝardeno", trovita de la germano *Richard Kunisch*. En la fabelo temas pri knabino, kiu enamiĝis al Vesperstelo. En tiu simpla motivo la poeto kreivkapablo vidis plurajn ideojn:

- unue, la fakto ke la amo ne konas limojn, ĝi kuraĝas proksimigi al eterneco la infanojn de la tero;

- due, *Eminescu* vidis romantike tipan ideon, troviĝantan ankaŭ en la verko de *Goethe*: la virineca eterneco levas nian spiriton al altaj sferoj;

- trie, li retrovis en tiu ĉi fabelo la ideon de *Schopenhauer* pri la neebleco de la genio, esti feliĉa surtere, kio kaŭzas la ĉiaman solecon de la geniuloj. En sia verko *Die Welt als Wille und Vorstellung* (La mondo kiel volo kaj ideo), *Schopenhauer* asertas, ke la geniulo vivas esence sola, li estas tro rara aperaĵo por trovi similulojn kaj tro diferenca de aliuloj, por esti lia kamarado;

- kvare, instigis la poeton al verkado de tiu gravega poemo lia granda amo al *Veronica Micle*, kiu amegis lin, sed tamen trompis liajn sentojn. Do, kiel ofte, la folkloro, la kulturo kaj la personaj spertoj, kaj ankaŭ la emo verki poemojn pri la astroj, entute pri la altaj ĉielaj sferoj, kuniĝis por oferi elokventan materialon al poeto kreiveco. Ni uzu la okazon por substreki estetikajn ideon, neatan fare de la formalistoj: La Vesperstelo, same kiel *Faŭsto* kaj tiom da aliaj ĉefverkoj pruvas, ke sen granda ideo ne povas naskiĝi granda arto.

Ĝis la majstroverko Vesperstelo atingis definitivan formon, ĝi trapasis plurajn variantojn. Sufiĉas mencii, ekzemple, ke la lasta verso de la unua strofo havis pli ol dek variantojn. La poemo komenciĝas kiel fabelo: "Estadis iam...", sed tio estas nur stereotipaĵo por alvoki fabelan atmosferon, ĉar la poemo estas ege kulture konstruita. (Bedaŭrinde la esperanta traduko de *Josef Petrin* restas multe sub la valoro de la originalo - eĉ la titolo "Luĉifero" maltrafas - tamen ĝi povas doni iun impreson sufiĉe validan por la eventoj de la verko).<sup>(3)</sup>

Jen la unuaj du strofoj:

*Estadis iam laŭ fabel' / Neniam samtiela  
En famili' de grandnobel' / Knabino ege bela.  
Unika estis la filin' / En ĉio sen komparo  
Samkiel Sankta Virgulin' / kaj l' lun' inter stelaro.*

Skize rakontate, imperiestra filino arde enamiĝis al Vesperstelo, suferas pro tiu senespera amo, sed jen iunmomente la brilanta stelo transformiĝas en belegan, supernaturan junulon Hiperiono. (Estetika rimarko: tiun nomon *Eminescu* prunteprenis de *Hölderlin*, ĉar greke ĝi signifas "tiu, kiu flugas supera", kaj ĝuste tian nomon *Eminescu* bezonis por sia verko. Tio denove montras, ke majstroverko devas optimumi ĉiujn siajn komponantojn ĝis la lastaj eroj, ekzemple ĝis la personaj nomoj. Por la ĉielaj sferoj de la poemo estintus fatalaj ĉiutagaj nomoj kiel Johano, Petro, Nikolaoo ktp.)

La filino daŭre sonĝas pri la astro kaj petegas ĝin veni al ŝi:

*En dorm' ŝi diras kun langvor' / Kaj ŝi al li veetas:  
"Ho, mia dolĉa Noktsinjor' / Vi venu, mi vin petas!  
Descendu, kara Stelvesper' / Radion surglitante,  
Penetru penson, en kamer' / La vivon lumigante."*

Li profundiĝis en maron, laŭ fabela ritualo, kaj aperis en ŝia ĉambro:  
"Li ŝajnis juna Vojevod' / Kun la hararo pruda"

kaj petas de ŝi forlasu la teran mondon kaj estu en la ĉielo lia fianĉino:

*"Ho, venu, mia amatin' / Kaj vian mondon lasu;  
Vi estu mia fianĉin' / Al Vesperstel' alpaŝu.  
Vi en palacoj el koral' / Jarcentojn jubileos,  
La tuta mondo, je signal' / El maro vin obeos."*

Sed ŝi ne komprenas liajn vortojn, eĉ timas lian aspekton, ĉar li estas "fremdulo laŭ parol', vizaĝ'": li brilos, ŝajnas nehoma estaĵo. Post kelkaj tagoj ŝi denove petegas lin reveni, li revenas transformita en aliaspektan belegan junulon, kaj nun ŝi petas lin forlasi la eternecon, fariĝi kiel ŝi, morta. Fine li pretas rezigni pri la eterneco por ĝui unu horon da amo.

*- "Sed, kiel fuĝi el ĉiel' ? / Vi estu komprenema:  
Eterna estas mia hel' / Dum estas vi mortema!"  
- "Mi ja parolas sen elekt' / Komenci eĉ mi ĝenas -  
Laŭ ŝajn' vi vortas sen difekt' / Sed mi vin ne komprenas  
Por amindumi vin en ver' / Kaj esti konfidema,  
Descendu, estu sur la ter' / Simile min, mortema!"*

*- "Por mia tuta senmortec' / Vi kison min oferas, -  
Sed, sciui ankaŭ kun certec' / Mi kiom amsuferas.  
Jes, eĉ per rompo de l' leĝec' / El peko mi naskiĝos;  
Ligita nun al eternecc' / De ĝi mi liberiĝos".*

Li malaperas plurajn tagojn de la ĉielo, ĉar li flugas longegan vojon ĝis al Demiurgo (kreinto de la mondo, Dio), por peti de tiu, nuligi sian senmortecon. Sed dum tiu tempo, *Katalina*, la filino, ricevas en sian ĉambro la viziton de paĝio *Katalin* (jam la nomoj similas, ĉar identas iliaj teraj naturoj). *Katalin* instruas al ŝi la amon:

*- "Por ke plenplene, amatin' / La amon vi ekkonu,  
Se mi vin kisos kun la klin' / La kison min redonu"  
Aŭskultis ŝi al la knabet' / Kun miro kaj amuzo;  
Honteme, kun ia impet' / Ŝi restas en konfuzo.  
Kaj diris ŝi: - "De infanec' / Sentaŭga ulo, klaĉa  
Mi konis vin, sed laŭ aprec' / Al mi nur ĝuste plaĉa.  
Sed iu Vesperstel' kun font' / En fora nenfeco  
Vastigas ĉe la horizont' / La maron en soleco*

.....  
*Amege brilas li al mi, / Doloron por estingi  
Sed supreniras pli kaj pli, / Sen eblo lin atingi  
Li venas kun frida radi' / De l'mond' lin disiganta...  
Eterne lin amegos mi / Li restos for, iranta...  
Similas tial mia tag' / Dezertan pejzaĝon  
La nokto ĉarma sen imag' / Superas mian saĝon.*

Ŝi do sincere konfesas al *Katalin* sian ardan amon al Vesperstelo, sed la ruza kaj sperta paĝio bagateligas tiun amfervoron.

*- "Vi pensas ja kiel infan' ? / Jen estas sav': forkuro!  
Serĉataj estos ni en van' / Perdiĝos nia spuro.  
Ni estos kun plej saĝa mens' / Kaj gajaj, sensuferaĵ  
Perdiĝos prige patra pens' / Kaj revoj vesperstelaj"*

Dum tiu tempo, do, Hiperiono flugas tra la astroj, alvenas al Demiurgo. Jen kelkaj strofoj de la sceno Hiperiono/Demiurgo:

*- "De peza, nigra eternecc' / Min, patro, liberigu  
Kaj tuta mond' en sinsekvec' / Ciame vin glorigu  
Je ĉiu prezo, mia Di' / Ho, ŝanĝu mian sorton  
Ĉar font' de l'vivo estas vi / Disdonas vi la morton  
Rigardan flamon prenu for / Kaj la eternan gloron  
mi ĉion ŝanĝe donas por / Da am' nur unu horon.*

.....  
 - "Hiperion", el profundaj' / Aperis vi en mondo,-  
 Rezignu al mirakla aj' / Sen korpo kaj sen fonda;  
 Vi volas esti kvazaŭ hom' / Kun li eĉ esti paro!  
 Pereu hom' en ĉiu dom' / Reestos la homaro...  
 Baziĝas ili nur en vent' / Sur idealoj vantaj,-  
 Se ondoj falas en silent' / Jen ondoj revenantaj...  
 Nur ili ĝuas pri bonŝanc' / Subpremo de la sorto,  
 sen temp' ni vivas, sen distanc' / Nin timas nek la Morto.

.....  
 Sub ŝajn' de aperanta fort' / La Morto nur kaŝiĝas;  
 Naskiĝas ĉiuj por la mort' / Mortintoj renaskiĝas.  
 Kaj restu vi, Hiperion' / Vi kie malaperos...  
 Kaj mi - kiel unua don' - / Saĝecon vin oferos

.....  
 Armeojn mi donacas vin / Siparon por transporto  
 Sur maro kaj je ter' sen fin' / Maleblas via morto! ...  
 Por kiu indas via mort' ? / Rigardu... jen la vero  
 Pri via atendanta sort' / Sur la vaganta tero"

Hiperiono reaperas sur la firmamento, disĵetas sian lumon kaj vidas la teranan amon de *Katalina* kaj *Katalin*.

Ĉar estas tempo de subir' / Kaj baldaŭ jam noktiĝas  
 La lun' kvietu el nadir' / Tremante elakviĝas  
 Per lum' pleniĝas la deliĉ' / De l' vojo en arbaro  
 sur bela tiliarba vic' / Sidadis juna paro

.....  
 Hiperion' el la izol' / Ilia miron vidis;  
 Nur brakon metis li sur kol' / Sur li ŝi brakon gvidis...  
 Odoras floroj sen kompar' / Kaj falas - pluvkoncerte -  
 Sur du infanoj kun harar' / Tre blonda, longa, - verte.

*Katalina* rigardas la ĉielon, vidas la astron kaj petegas tiun descendi kiel antaŭe kaj doni al ŝi la veran feliĉon. Hiperiono finfine komprenas la verajn-on de la Diaj vortoj, komprenas sian netaŭgecon por feliĉigi teranojn kaj esti mem feliĉa inter ili. Por *Katalina* - kutima terfiguro - tute egalas, ĉu temas pri astro aŭ paĝio.

Li tremis kun estinta dec' / Sur montoj kaj arbaroj  
 Gvidante kun paca solec' / La movon de l'ondaroj,  
 Sed ne plu falas laŭ regul' / El alt' en marluzuron;

Kaj li donas al ŝi senmortan respondon, ofte citatan, ankaŭ hodiaŭ:

- "Se estos mi aŭ aliu!' / Ne tuŝas terfiguron!  
 Vi vivas en malvasta rond' / Kun la hazardo via,  
 Mi sentas min en mia mond' / Senmorta kaj glacia".

Samkiel la enkonduke cititaj poetoj *Lenau*, *Leopardi*, *Lermontov*, ankaŭ *Eminescu* mortis juna. En lia 34a jaraĝo ĉesis lia kreado. Terure ekspluatita ĵurnalisto li estis, por mallonga tempo ankaŭ inspektoro de distriktaj lernejoj, sed, pro politika ŝanĝo de la registaro, li perdis tiun funkcion.

La firma, senkompromisa karaktero, liaj satiraj poeziaĵoj kaj politikaj intrigoj alportis al la granda poeto gravajn malamikojn kaj multajn dolorojn. Nekutime sentema li estis, tre malfacile, malriĉe li vivis, li frutempe malsaniĝis verŝajne ankaŭ pro heredita malsano.

Kiel li estis dirinta en sia poeziaĵo "Ĝis la stelo", hodiaŭ en pluraj landoj oni vidas en vera grandeco la briladon de la astro.

En la Universitato de *Bucuresti* funkcias aparta fako pri "emineskologio".

### Notoj

- (1) La versojn, kies tradukinto ne estas menciita, tradukis la aŭtoro
- (2) Citajo laŭ *Liviu Rusu* en "De la *Eminescu* la *Lucian Blaga*". *Cartea roma ească*, 1981, p.79
- (3) Lastatempe aperis en la Eldonejo *BERO* (Usono) multe pli altvalora traduko de tiu ĉi poemo fare de *Josef Nagy*: "La *Vesperstelo*"

### Bibliografio

*Dictionarul literaturii române de la origini până la 1900*. (La vortaro de la rumana literaturo ekde la originoj ĝis 1900). *Editura Academiei Republicii Socialiste România, Bucuresti*, 1979.

*Eminescu după Eminescu. Comunicări prezentate la Colocviul de la Universitatea din Paris-Sorbona, 12-15 martie 1975*. (Eminescu post Eminescu. Komunikaĵoj kaj referaĵoj prezentitaj dum la Kolokvo de la Universitato Paris-Sorbona, 12-15a de marto 1975). *Editura Junimea, Iași*, 1978.

*Rusu Liviu*: *Eminescu*, en "De la *Eminescu* la *Lucian Blaga*", 1981, p.11-162.

### Adreso de la aŭtoro:

*Prof. Dr. Ignat Florian BOCIORT*  
*Wustrower Strasse 1*  
*DE - 13051 - Berlin*  
 Germanio

### Priaŭtoro informo:

La aŭtoro estis multajn jarojn profesoro pri rumana lingvo kaj literaturo en la Universitatoj de *Bucuresti*, *Timișoara* kaj *Berlin* (gastdocento).

Okaze de la 150-jara datreveno de la plej granda rumana poeto li faris en Germanio (rumane, germane kaj esperantlingve) prelegojn pri diversaj aspektoj de la mondkonata lirikisto.